



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj  
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

## ASSEMBLEA GENERAL DE SOCIS

Una vegada més hem de recordar a tots els nostres socis, individuals i col·lectius, que el dia 1<sup>er</sup> de juliol, a les 10 del matí, tindrà lloc al nostre estatge social, València, 245, entre-sol, l'assemblea general de socis, i en fer recordar aquesta data als companys federats ho fem per tal que l'assistència a l'assemblea sigui presa com una obligació que no pot oblidar-se.

No ja solament el compliment dels preceptes reglamentaris ens mana que tots complim amb el nostre deure, sinó que els alts interessos del moviment esperantista català exigeixen la nostra atenció per tal de millor descabdellar la nostra tasca.

El nostre temperament, individualista en extrem, ens impossibilita de portar a terme les empreses que el moviment exigeix i que la disposició favorable de diferents estaments de la nostra terra els donaria una realització pràctica i eficaç.

Esperem, doncs, que els lluitadors de l'esperantisme estaran al nostre costat i formaran amb nosaltres per al bé de l'Esperanto a Catalunya.

## INTERNACIA KONFERENCO EN VIENO

MAJO 1934

## Por Esperanto en lernejon kaj praktikon

## ORGANIZO

Ekstere, nome, tre alloga: sub protekto de la Konfederacia Prezidanto de Aŭstrio S-ro. Vilhelmo Miklas kaj sub la Honora Prezido de l'Kanceliero S-ro. Dro. Engelberto Dollfuss. Prepara kaj invita Komitato el multaj altrangaj fakuloj kaj oficialuloj el Vieno, el Aŭstrio. Tial oni disponis palacojn, vizitojn kaj akceptojn oficialajn plej altajn, kiuj vere sukcesis kaj ĉarmis.

Sed la materian laboron, vendon de biletoj por ekskursoj kaj aliaj menditaĵoj, faris persone, kiam kaj kie povis, nur S-ro. Hugo Steiner; kaj per tiu persona interveno li fariĝis viktimo de la konferencanoj, kaj, ĉi-tiuj, viktimoj de li.

La laborkunsidojn tre bone gvidis S-ro. Scholz, kiu esperanten kaj el Esperanto ofte interpretis tre bone.

La Direktoro por eksteraj aferoj de nia Movado agadis tre lerte en pluraj okazoj por lingvaj aŭ parolaj interrilatoj inter konferencanoj kaj enlandaj aŭtoritatoj.

S-ro. Hugo Steiner agadis ĉiam tre efike kiel ligilo inter nia Movado kaj la registaraj kaj ceteraj enlandaj organismoj aŭstriaĵ.

Nia opinio estas ke la Konferenco tro forte ŝajnis pli ol teknika, esperantista; kaj tiu aspekto sindetenigis multajn teknikistojn pri lingvaj kaj lernejaferoj, kiuj varbiĝus por Esperanto se ili venus unue kiel teknikistoj.

## INTERKONATIĜO

Por tiu celo la Programo difinis kunvenon vespermanĝan, por sabato, 19 majo. Mi alvenis Vienon tro malfrue kaj ne povis ĉeesti ĝin.

## EN DOLLFUSS-LANDO

Dimanĉe, matene, komenciĝis la programo per katolika solena diverso. Malbedaŭrinde, estis prediko en Esperanto por esperantistigi katolikojn kontraŭ oficiala programnumero por katolikigi esperantistojn.

En unu el la laborkunsidoj, aŭstria profesoro informis nin pri la enlanda registara decido devigi gelemantojn de komercernejoj ĉeesti kursojn pri katolikismo. Kiel havigi, al tiuj

gelernantoj, ankoraŭ tempon por Esperanto? — Mi respondas tie-ĉi: Malaperigante el la lernejprogramoj ĉion, kio estas malmanka laŭ pedagogia kaj faka celo. — Mia respondo ne estis ebla en Dollfuss-lando.

### SOLENAĴOJ

Solena malferma kunsido de la Konferenco okazis ĉiurilate tre sukcese en la aŭstria Parlamentejo, sub prezido kaj partopreno saluta kaj amika de la Ministro pri Agrikulturo, kiu reprezentis oficiale la tutan registaron. Salutis en sia lingvo kaj en Esperanto ĉiu reprezentanto de alia nacio. Kompreneble tion faris en kataluna lingvo kaj Esperanto, Profesoro de l'Escola d'Arts i Oficis de Terrassa, kiu ĉeestis kiel konferencano kaj reprezentanto de K. E. F.

Tre trafe paroladis favore al Esperanto en lernejon kaj praktikon enlanda lernejinspektoro Dr. Fr. Wollmann, Ing. E. F. Petritsch kaj nia eminenta vortaristo Dro. Ing. Eugen Wüster.

Kantoj, muziko, plidolĉigis ankoraŭ tiun solenaĵon, kies sukceso gratuligis nian aŭstrian pioniron ŝtatkonsiliston Hugo Steiner.

La konfederacia Prezidanto Miklas bonvolis akcepti la eksterlandajn konferencanojn, kaj afable interŝanĝigis salutparoladojn kun bondeziroj por la sukcesigo de Esperanto.

Ĉiu havis okazon manpremi Sron. ŝtatestron Wilhelm Miklas, kaj konstati lian emon komplimenti la vizitantojn.

En la Ministrejo de Publika Instruado okazis speciala teakcepto por la fremdaj profesoroj kaj la oficialaj reprezentatoj en Vieno de la landoj el kiuj venis konferencanoj. Agrabla surprizo por ĉiuj estis la fakto ke dum ĉiuj kamarade te-parolis, te-babilis, te-kunfratiĝis, enpenetris la te-akceptejon la kanceliero Dollfuss, kiu, tre simple kaj afable, intersalutiĝis kun ĉiuj ĉeestantoj.

Ankoraŭ per nova akcepto la konferencanoj estis honorataj: ĉe la urbdomo kiun detale montris kaj priskribis al ni urbdomano. Vere riĉa kaj glora aperis al nia konstato kaj kompreno la administra palaco de la aŭstria ĉefurbo post la rimarkigoj faritaj por nia vido kaj scio. La vicurbestro paroladis al ni favore al la urbo kaj al nia movado, kaj esperis ke ni diskonigos tra la mondo la allogaĵojn de la bela Vieno.

Nova solenaĵo, tre grava por la propagando, konsistis je Radia disaŭdigo, sub direkto de ŝtatkonsilisto Hugo Steiner, de resuma impreso de la ĉefaj eksterlandaj konferencanoj pri

la laboro kaj la ĝojo de la restado en Vieno. Ĉiu diris en sia nacia lingvo kaj en Esperanto eron de tuta parolado.

### LABORO

Ĉiutage, de la 20 ĝis 24 majo, kunsidis por laborado la profesoroj kaj aliaj fakuloj.

Temo plej avide diskutata estis *Esperanto en la lernejon*.

Pri tio prelegis profesoro Scholz, kiu evidentigis per rezultoj konstatitaj kaj esploritaj, ke lernigo de Esperanto estas plej konvena por konsciigo pri gramatiko de propra lingvo kaj por faciligo de lernado de fremdaj lingvoj.

Raporto de la ĝeneva Pedagogia Instituto J. J. Rousseau pri tiu temo, farita jam antaŭ kelkaj jaroj, kaj detale memorigata en ĉi-tiu Konferenco, ankaŭ estas tre ŝatata kaj opiniata tre konvinka kaj elokventa.

Multaj partoprenantoj aldonis personajn konstatojn kaj alportis materialon favoran pri la instrua valoro de Esperanto en la lernejo; kaj montriĝis ke la spertoj estas identaj en plej diversaj nacioj.

Diskuto estiĝis insista ĉu konkludo devas esti por laŭvola aŭ por deviga lernigado de nia lingvo en lernejon, kaj en kiajn lernejojn. Sed nur saĝo kaj prudento elmontriĝis konsilindaj per rekomendo ĉiulande kaj eĉ ĉiuvilage laŭ lokaj cirkonstancoj kaj ebloj.

Plej favoraj al Esperanto montriĝis per partopreno kaj informoj al la Konferenco Radio-stacioj de Brno, de Vieno kaj de Lyon. Mi devis reveturi al Katalunujo la 24an. matene, kaj tial ne povis ĝeesti la lastan laborkunsidon en kiu estis voĉdonotaj definitivaj konkludoj, kiuj, eble, publikiĝos kiam aperos ĉi-tiu raporto pri la Konferenco.

Ankaŭ estis vigla la partopreno de policaĵ esperantistaj organizoj. Bedaŭrinde mankis alportadoj de laboristaj, religiaj k. a. fakaj movadoj, kiuj povus montri novajn spertojn kaj vojojn de utiligo de Esperanto.

En la tria laborkunsido estis tre impresive ke deputito de la franca Parlamento salutis nome de la grupo de francaj parlamentanoj amikoj de Esperanto, anoncante ke tiu grupo konsistas jam el 62 deputitoj, kaj ke nun estas organizata, en Francujo, grupo de senatanoj amikoj de nia afero.

### PRAKTIKO

S-ino. Morris, la malavara amikino de internacia lingvo, kiu puŝas per I. A. L. A. difinon de plej bona solvo, kiu

certe post tiu provo per I. A. L. A. konvinkigās ke tiu plej bona solvo, universale kaj praktike, estas Esperanto, ankaŭ venis al la konferenco, kaj flue, korekte parolis al ni en Esperanto. Ĉar ŝia edzo estas ambasadoro de Usono en Bruselo, la belga ĉefurbo, kaj mia kataluna amiko Salvador Albert estis, de la Hispana Respubliko, konsulo en tiu ĉefurbo, mi demandis S-inon. Morris ĉu ŝi interkonatiĝis kun Salvador Albert en Bruselo. Kaj efektive, ne nur okazis tiu konatiĝo, sed ankaŭ okazis la bela fakto por Esperanto kaj por Katalunujo, ke nia usona altranga samideanino profitis okazon por montri al Salvador Albert, per la fama verko «Kataluna Antologio», ke ŝi estis leginta katalunan literaturaĵon de li dank'al esperanta traduko.

Agrabla surprizo kaj elokventa pruvo de efiko de Esperanto al kataluna aŭtoro, kiu vere estas delikata poeto kaj forta intelektulo.

#### DANKEMO

Al la Registaro de Aŭstrio, kiu tiel afable helpis sukcesigon de la Konferenco. Al la ŝtatkonsilisto kaj esperantista pioniro aŭstria S-o. Hugo Steiner kiu tiel fervore klopodis por interesi la Registaron kaj organizi la Konferencon.—Dankon!

DELFI DALMAU

#### LA PENSOJ DE MIA ANIMO

La pensoj de mia animo similas  
Al la ŝanĝiĝemaj vetero kaj vento:  
Jen ili funebras en nokto plorpeza,  
Jen laŭte jubilas pro ĝoja altsento.

La pensoj de mia animo similas  
Al sonoj de trem-melodi' mandolina.  
Jen kiel ĝi kantas, al koro penetras:  
Dolĉega revado, sopiro senfina!

La pensoj de mia animo similas  
Al blankaj birdetoj en blua aero:  
Jen ili ĉielen ŝvebadas facile  
For de la mallumaj abismoj de l' tero.

La pensoj de mia animo similas  
Fantasmagoriojn sen baroj, sen limoj;  
Ke ilin ne vento subita forblovu,  
Kaptforĝas mi ilin je ritmoj kaj rimoj.

TEO JUNG

**XVI.aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ**

## ORDINARAJ TEMOJ

*Originalaj Tekstoj*

- I Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II Originala Ama verko en prozo.

*Tradukitaj Tekstoj*

- I Traduko de unu el la versaĵoj de la konata kataluna poeto Joan Maragall.
- II Traduko de la kataluna rakonto «Sobre la mandra...», de Prudenci Bertrana. Vidu ĝin en la numero 200-201.

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I Premio de la Urbestro de Ripoll, 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- II Premio de la Prezidanto de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- III Premio de la Estraro de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV Premio de KATALUNA ESPERANTISTO. Dumviva abono al la gazeto. Temo: Kiel oni faras bonstilan versan tradukon.
- V Premio de la grupo «Paco kaj Amo», 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VI Premio de la grupo «Barcelona Stelo», 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

Pliaj premioj kaj temoj sekvos en venontaj numeroj de KATALUNA ESPERANTISTO.

*Verkoj ricevitaj.* (Unua listo ĝis 1.<sup>a</sup> junio 1934a.)

- 1 La Nigra Lilio. — 2 Balado. — 3 Serenado. — 4 Florkrono de Esperanto. — 5 Saluton, Kajeno! — 6 Koro, Koro! — 7 El Fet. — 8 El Tjutĉev. — 9 Jam kiu nokt'! — 10 XXX. — 11 Nun kaj iam. — 12 Naŭ teatraĵoj. — 13 Naŭ sonetoj. — 14 Ok poemoj.

NOTOJ: ĉar la XVIIa Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio okazonta en Ripoll, estas prokrastita ĝis 1935a, ankaŭ prokrastiĝis la XVIaj. Internaciaj Floraj Ludoj. Pro tio la datolimo por ricevo de la verkoj estas plilongigita ĝis la 31a. de Decembro de 1934a.

Novajn premiojn kaj temojn ni diskonigos en venontaj numeroj de KATALUNA ESPERANTISTO. — La Sekretario, Joan Gili Norta.

## LA ŜNURTIRO

de M. E. Francis

(Daŭrigo.)

La poŝtisto kontente rigardis ĝin; jen rozoj kaj rubandoj — vere nenio povus esti pli bela aŭ pli taŭga por amika saluto. Plie, plaĉis al li rimarki ke sur ĝi estas presita nenia malsaĝa devizo.

«Jen», li diris, «mi elektas tiun. Ĝi estas belaĵo. Komplete donu koverton, mi petas, fraŭlino».

Ricevinte koverton de taŭga grandeco, kaj plue provizite je plumo kaj inko, li penege skribis la nomon kaj adreson de F-ino. Bojt, dum la juna vendistino sufiĉe malstreĉiĝis por noti tion. Prenante poŝtmarkon el la provizo, kiun li tenis preta por necesa okazo, Kando alfiksis ĝin, pagis ses pencojn, kaj eliris el la butikoj. Enpoŝtiginte la koverton, li hejmen iris, ridante en si.

«Ses pencoj», li murmuris. «Tio ne kostis multe, kaj mi vere kredas, ke ĝi donos al la kompatindulino tiom da plezuro kvazaŭ ĝi kostus mil funtojn!»

La sekvantan matenon li malkontentiĝis, trovante la pordŝtupon de S-ino. Inkpen jam purigita, kaj ne vidante Suzanon. Tamen, tuj kiam la ĝardenpordo moviĝis sur siaj ĉarniroj, la dompordo ekmalfermiĝis, kaj F-ino. Florenc aperis sur la sojlo. Ŝi ne aspektis tiel bela kiel foje, ĉar ŝia vizaĝo evidente estis ankoraŭ nelavita, kaj la nigraj haroj, kiuj pli malfrue estos tiel ĉarme frizitaj, ankoraŭ estis tenataj de friziloj. Dum Kando alproksimiĝis iom malrapide, li mense komparis ŝian ŝajnon kun tiu de ŝia onklino, kies bonhumora vizaĝo lumis per pureco je la plej frua horo, kaj kies malnovmodaj bukloj ĉiam seniĝis je la frizpaperoj antaŭ ol Suzano eliris el sia malgranda mansardo.

—Ĉu leteron por mi? — ekkriis Florenc, kiam la poŝtisto, kun mieno de ŝajnigita nezorgo, etendis la grandan koverton kun ĝia preslitera adreso. «Valentino!» Ŝi aldonis, ĉar vere la sendaĵo elmontris sian naturon al la unua ekvido.

—Ne por vi hodiaŭ, mi pensas — respondis Kando, ŝajnigante silabi la adreson—. Ne, ĝi estas por F-ino. Suzano Bojt. Kie estas via onklino? Mi ne povas memori ke mi iam antaŭe alportis leteron al ŝi.

—Letero por onklino Suzano! — kriis Florenc, kun grandega surprizo.

Jam malfermiĝis dormĉambra fenestro, kaj ekaperis la nekombita kapo de la pli juna nevino.

—Ĉielo! — ŝi ekkriis—, vi vere ne volas diri, ke estas letero por onklino hodiaŭ!

Kando suprenrigardis kun ridetaĉo, kaj poste, estante diskretulo, forturnis la okulojn, ĉar F-ino. Mabel estis ankoraŭ en tio, kion oni povas nomi «duontualetto».

—Efektive estas. Ĉu unu el vi ne volas venigi ŝin? Kie estas F-ino. Bojt?

—Ŝi nun donas manĝaĵon al la porko — respondis Florenc—. Mi prenos la leteron, poŝtisto. La ideo, ke iu persono skribu al la onklino!

—Ne, mi ne fordonos la leteron al iu, krom tiu, al kiu ĝi estas adresita—firme diris Kando—. Kuru do por venigi ŝin, knabinjo; mi pensas ke estas bone, ke mi liveru tiun ĉi leteron en ŝian propran manon. Vi ne povas atendi, ke vi ricevu ĉiujn leterojn — li aldonis, kun trembrilo en la okulo. —Mi tute ne komprenas, kial vi devas esti ĉagrenita pri la afero. Se mi estus vi, mi montrus min kontenta, eĉ se estas onklino kiu ricevas valentinon, kaj ne vi. Mi estas certa ke la karto, kiun mi alportis al vi hieraŭ, devus kontentigi vin iomtempe, per ĉiuj kisoj vicigitaj sur ĝi!

—Ĉesigu la mokadon — kriis Florenc, reprenante iom da bonhumoro, dum ŝi malrapide turnis sin por plenumi lian peton.

Sed dume la malantaŭa pordo malfermiĝis, kaj la diketa figuro de Suzano aperis je la fino de la mallarĝa koridoro. Metinte teren la sitelon, ŝi rapide antaŭeniris responde al la alvoko de sia nevino, sed haltis mezvoje pro la impresa vizio de poŝtisto Kando, kiu staris svingante la grandan koverton en aŭtoritata maniero.

—Mi alportis ion al vi hodiaŭ, F-ino. Bojt — li solene anoncis—, kaj ĉar tio estas afero, kiu neniam antaŭe okazis, laŭ mia scio, mi volas liveri ĉi tion en vian propran manon.

Li sentis sin duonamuzata kaj duonpenta, vidante ŝin paliĝi pro liaj vortoj.

—Leteron por mi! Ĉu efektive? Mi esperas, ke tio ne havas malbonan signifon.

Florenc ĵetis mokan ridon, kiun Mabel eĥis pli afable de la dormĉambra fenestro.

—Ĉielo, onklino! — kriis Florenc—, kia malbona novaĵo povus veni al vi? Vi ne havas amikojn. Poŝtisto kaj mi pensas ke ĝi estas valentino.



—Valentino! — ekspiris Suzano, klinante sin sur la pordosto—. Nu, kiu ajn volus sendi al mi valentinon? Estas vera tio, kion vi diris, knabinoj; mi tute ne havas amikojn.

—Eble iu mokridas pri vi — sugestis Florenc, kun gaja ridaĉo—. Tiuj harbukloj viaj; ili estas sufiĉaj por ridigi katon! Eble iu vidis ilin, kaj sendis valentinon kun korktirilo sur ĝi.

—Ne kredu tion — kolere kriis Kando—. Multe pli kredeble ke ĝi venas de vera amiko; iu, kiu scias kiel estimi vin—li aldonis emfaze.

Tiam, timante ke li elmontris nediskretan varmecon, li turnis sin, rapidigante la paŝojn kiam li aŭdis la du nevinojn urĝi al Suzano ke ŝi malfermu la leteron kaj vidu tion, kion ĝi enhavas. Sed antaŭ ol li atingis la finon de la vojeto, la voĉo de Suzano, laŭta, preskaŭ pasia, sonis al lia orelo;

—Mi tute ne faros tion. Ĝi estas mia, kaj mi tenos ĝin al mi mem. Unufoje en la vivo mi havas ion mian propran!

—Bone dirite — diris poŝtisto Kando al si mem, skuante aprobe la kapon dum li formarsiĝis. Li ĝojis ke Suzano asertis siajn rajtojn, sed li ne povis ne esperi ke ŝi baldaŭ ŝanĝos la intencon, kaj montros la puntbodyeritan trofeon al la envidemaj knabinoj. Li pensis kun treega kontento pri ĝiaj belaĵoj; la rozoj — kiel eble laŭnaturaj; la bluaj silkaj rubandoj, kiuj ruze ŝajnis teni ilin, kun la finaĵoj pendantaj ĝuste kvazaŭ ili pendus de reala floraro. Ĝi certe estis mal-kara je la prezo de ses pencoj. Li pensis pri la triumfo kaj ĝojo de Suzano, pri la nevola admiro de la nevinoj, pri iliaj sensukcesaj provoj diveni la identecon de la sendinto. Neniu el ili iam divenos. Eble ili imagos, ke Suzano havas veran admiranton en la vilaĝo, kaj ŝia socia rango estos pro tio multe pli altigita. Kaj kia penso — ke ĉio tio estis kaŭzita per la elspezo de ses pencoj — la prezo de ses poŝtmarkoj aŭ du boteloj da biero Kando gratulis sin je la penso, kaj ĵuris ke li neniam elspezis monon pli profite.

La tutan tagon li restis en la ĝojega kaj singratula stato kiu rezultas el la konscio esti plenuminta bonfaron per mal-granda elspezo; kaj li ankoraŭ pensadis pri Suzano Bojt kiam, laca post la dua rondvojaĝo, li atingis la hejmon en la vespero.

Je lia surprizo, hela lumo brilis tra la kuireja fenestro, kaj kiam li malfermis la pordon, li rimarkis ke fajro salte brulis en la kameno. Nu, plej ofte lia fajro estingiĝis dum lia foresto, kaj li estis devigata rebruligi ĝin pene je sia reveno,

se efektive li ne kontentigis sin per la eta kuirforno jam menciita, kiu faris nur malmulte da komforto je malvarma vespero. Plie li mirigate rimarkis, ke lia lampo estas ordigita kaj bruligita, ke la tablo estas pretigita por la vespera manĝo, kaj ke virina figuro sidas apud la kameno.

—Sinjorino Adlem! — li ekspiris, haltante sur la sojlo, surprizite ke la najbarino, kies servoj kutime estis limigitaj al la mateno, volus viziti lin je tiu vespera horo.

—Ne estas sinjorino Adlem — respondis la voĉo de Suzano—, estas mi, snijoro Kando. Mi ne povis ne veni, pro la valentino, vi scias.

Kando fermis post si la pordon, zorge frotis la botojn sur la mato, kaj eniris la ĉambron kun konfuza mieno. Ŝu Suzano venis por fari demandojn pri la sendanto de la valentino, aŭ ĉu estas eble ke ŝi jam eltrovis?

Ŝi leviĝis kiam li alproksimiĝis, kaj paŝis al li, tia transformita, transfigurita Suzano, kun vizaĝo kiu aspektis pli juna je dekkvin jaroj, kaj kiu efektive estis preskaŭ bela en sia ardo de feliĉeco! Ankaŭ ŝi estis surmetinta la dimanĉan robon, kaj portis banton el blua rubando ĉe la kolo.

—Mi venis iom tro frue — ŝi rapide klarigis—, kaj mi pensis ke estus bone, ke mi iom ordigu la ĉambron, kaj preparu por vi la manĝon; kaj jen estas viaj pantofloj apud la fajro; mi pensas ke ili jam estas ŝatinde varmaj, kaj mi infuzis la teon, do ĉio estas preta. Sed unue deprenu la botojn.

Kando pendigis la ĉapon sur hokon apud la pordo, kaj, irinte al la kameno, komencis malrapide demeti la kotkovritajn botojn.

Suzano staris rigardante lin ĝis kiam lia kapo kliniĝis super la tasko, kiam ŝi daŭrigis per iom tremanta voĉo:

—En la momento mem kiam mi malfermis la leteron, sinjoro Kando, mi sciis ke ĝi venas de vi; kaj kiam mi tiris la ŝnurojn kaj legis la internan skribaĵon, ho, mi ne povas diri tion, kion mi sentis! Mi ne rakontis ion pri ĝi al iu, sed mi elŝteliris kiel eble plej frue; nu, ne estas grave al mi, se ili ĉiuj grumblas hodiaŭ; kaj mi demandis ĉe Burton — estis necese ke mi certigu, vi scias, pro tio, ke estas tre grava afero—kaj kiam mi trovis, ke efektive estas vi, kaj neniu alia, kiu aĉetis la valentinon—nu, mi ne povas diri kiel ĝoja mi sentis min! Mia koro kvazaŭ kantadis al si la tutan vojon. Kompreneble mi venis rekte tien ĉi, ĉar la valentino diris ke mi devas mem prizorgi la restantan faro-

taĵon. Tiam, kiam mi vidis ke vi ne estas tie ĉi, mi pensis ke estus bone, ke mi atendu ĝis vi venos. La tempo ne ŝajnis tre longa, ĉar mi daŭrigis pensi la tutan tempon: «Jen kiel mi faros kiam mi kaj Kando estos geedzoj!»

(*Daŭrigota.*)

LOUISE BRIGGS

## ESTIS REG' EN MIA LANDO

(*Muziko de Miquel Ferrer*)

### I

Estis reg' en mia lando,  
kun ama dolor'.  
Iu bela princineto  
vundis lin ĉe l' kor'.

La princin' lin rifuzadis,  
ĉar estis paĝi'  
tute bela kaj ĝentila,  
kiun amis ŝi.

Tiu reg' pri ŝi pensadis  
en ĉiu moment',  
kaj pro song' je ŝi, la dormo  
estis dolĉa sent'.

### II

Ĉiun tagon li vekigis  
kun ĉi tiu preg':  
Diru vi al la princino  
la amon de l' reg'.

Ke al sceptro mankas oro  
de ŝia harar',  
al animo mankas lumo  
de ŝia rigard'.

Li sopiris la princinon  
en ĉiu moment',  
kaj pro song' je ŝi, la dormo  
estis dolĉa sent'.

## III

Fine mortis princineto  
 pro ama dolor'.  
 Jus de l' reĝo sur la trono,  
 mortis ŝia kor'.

Oni portis ŝin en tombon  
 kaj aŭdiĝis kant',  
 ĝin kantadis la paĝio,  
 fidela amant'.

Kiam aŭdis ĝin, la reĝo  
 kriis kun turment',  
 kaj por ĉiam li dormiĝis  
 pro ĵaluza sent'.

JOSEP BEDÓS

*El la kataluna lingvo tradukis* JAUME GRAU CASAS, L. K.

## BIBLIOGRAFIO

Evangelio de Sinkompletigo, de Okamoto-Rikici, Vol. VI de «Evangelioj kaj Belismo». Eldonis: Belisma-Koopera-Kulturejo.

Broŝuro 43-paĝa pri nova religia movado japandevena. Stilo tre bona.

Rumana Bonhumoro, de P. Firu kaj S. Pragano. Eldonis: Leo Moreau, Raapopscheweg 55, Arnhem, 1932.

Bela volumo 64-paĝa, kun kvin elektitaj rakontoj, el kiuj elstaras «Du lotbiletoj» kaj «La venkinto de Napoleono». Tiu ĉi lasta ŝajnas respeguli la specialan ironion de Mark Twain. La traduko estas bonega.

En antaŭparolo, S. Pragano diras, ke «ni devas prezenti en niaj tradukaj klopodoj ĝuste la specialaĵojn de ĉiu popolo, ĝuste tion, kio iomgrade diferencigas nacion de nacio ne forviŝante per tio la stampon de la homeco ĉizita nedetruible en ĉiun homan estajon.»

Nia teatro. — Du teatraĵoj. — Parolĥoroj. — Versoj kaj deklamo. Eldonis: Sennacieca Asocio Tutmonda, Eldona Fako Kooperativa. — Leipzig.

Libreto 64-paĝa, bone presita. El la enhavo elstaras la sprita teatraĵeto «La lignovermo», klastabala.

Goethe. — Memorjaro 1932 Weimar. Bela folio, ilustrita, pri la malnova rezidencurbo Weimar, kiu enhavas la programon de la Goethe-memorsemajno. La Verkehrrsverein Weimar (Germanujo)) senpage sendas la folion al interesuloj.

Ljubljana. Gvidfolio pri la ĉefurbo de la slovena popolo, kun belaj ilustraĵoj kaj plano. Ljubljana estas grava el vidpunktoj arta kaj kulturhistoria.

Anstataŭa edzino de Erica Maxwell. El la angla tradukis M. Sampson. 212 paĝoj. Prezo broŝ.gmk. 3.20, bind.gmk. 4.80. Eldonejo «Heroldo de Esperanto», Brüsseler Strasse 94, Köln, Germanujo.

Tiun ĉi romanon, tre bone tradukitan, oni legas kun intereso. Ĝi parolas pri la vivo en la moderna Rusujo, sed ni trovas, ke la aŭtoro ne klare verkis pri ĝi kaj nur prezentis ian konfuzan malfavoran bildon. Kelkloke la aŭtoro aludas esperanton kun simpatio.

Homarisma Laboro. De Kenelm Robinson. Unuakta teatraĵo. Ĉefdeponejo: «Literatura Mondo», Budapest.

Ni miris, ke sub la nomo de la aŭtoro oni mencias: la aŭtoro de «Se grenereto» kaj «Vol 11». Oni permesu al ni diri, ke doni al iu verko la titolon «Vol. 11», sen ia videbla rilato kun hipotezaj Vol. I kaj Vol. 111, estas stulte. Ĉu vi scias, kian homogenan anhavon prezentas «Vol. 11»? Ĝi konsistas el noveloj kaj poemoj «en la angla kaj esperanta lingvoj». Kaj ĝi enhavas 72 paĝojn!

Antaŭ jaroj oni parolis pri «Gazetfonda febro». Nu, ni kredas, ke tio estas «libreldona febro». Kial presigi en sama volumo anglajn kaj esperantajn poemojn?

Historio de Kristo, de Giovanni Papini. Esperantigita laŭ dezir-esprimo de la aŭtoro, de anonima itala samideano. Eldonis: A. Paolet, San Vito al Tagliamento (Italujo)), 1931. Prezo: 40 liroj.

Volumo 576-paĝa, unu el la plej interesaj aperintaj en Esperanto. Oni ĝuas en ĝi certe originalan prezentadon de la «doktrino de Jezuo», sed mi povas diri, ke mi preferas la Jezuson de Papini al la Jezuo de multaj aliaj aŭtoroj. (Mi ĵus legis la Vivon de Jezuo, de Dickens, kaj ankaŭ en ĉi tiu okazo mi ŝatas la verkon, pli ol la Novan Testamenton mem). Eĉ nekredanto admiros la belecon de la verko de Papini, la belecon de la Kristaj instruoj, kvankam tiom da malbonaĵoj

kaj maljustaĵoj oni ofte kaŝis malantaŭ la nomo de Kristo.

La traduko estas bonega, kaj oni sentas ĉiupaŝe, ke, same la verkinto kiel la tradukinto, estas homoj tre inteligentaj... El lingva vidpunkto, oni povus fari kelkajn riproĉetojn: Oni estas indaj... kaj aliaj, similaj.

La unua Suplementa Legolibro de Esperanto, de Kooĵi Taŝiro. Eldonejo Kiboŝa, Tokio, 1932.

Belega eldonaĵo japana, pli ol 100-paĝa, kun ĉarmaj desegnaĵoj.

Fundamentoj de Leninismo, de A. Stalin. Eldonejo «Ekrelo», Leipzig, 1931. Prezo: 1 gm. Lekcioj legitaj en Sverdlova Universitato, en aprilo 1924. El la rusa lingvo tradukis G. Stellih.

Tiom interesa estas tiu verko, ampleksanta 122 paĝojn, ke mi, eĉ ne estante, laŭdire, komunisto, min sentis pelata traduki kelkajn ĝiajn ĉapitrojn por apero sur katalunaj ĵurnaloj.

Mi ĝoje konstatas, ke la tono de tiu verko tute ne similas al la tono de la plejmulto el nialandaj komunistoj. Ĉu ili estas pli ruĝaj ol la rusaj aŭ sovetiaj komunistoj, aŭ ĉu en la Leninismon ŝovis sin iom da «etburĝa» spirito?

Mi kredas, ke, en landoj ne infektitaj de faŝismo, povas havi propagandan valoron la aserto ke niaj sovetiaj kamaradoj entreprenis samtempe la eldonon de la plena verkaro de Lenin, ideologo, kaj de Puŝkin, nacia poeto kaj literaturisto.

Polèmica, de Delfí Dalmau. Edicions «Clarisme». Barcelona, 1934. Prezo: 3,25 pesetoj. (En kataluna lingvo)

Plaĉa volumeto, 200-paĝa, enhavanta tri polemikaĵojn pri aferoj lingvaj kaj politikaj, kun: Mercè Rodoreda, nova inteligenta verkistino kataluna; Carles Varela, propagandisto de la lingvo «Occidental» en Katalunujo, kaj José Ortega Gasset, eminenta verkisto kaj filozofo hispana.

La esperantistojn interesas ĉefe la polemiko pri «Occidental», lerte gvidata de nia amiko Delfí Dalmau. Sed nia persona opinio estas, ke, almenaŭ en nia kataluna lando, kie neniam «Ido» aŭ «Occidental» konkeris gravan terenon, estas preferinde tute ne aludi publike la ekziston de aliaj projektoj de internacia lingvo. La publiko jam scias, ke ni havas gravajn verkon en Esperanto. Kio estas aperinta en «Ido», «Occidental» aŭ «Interlingua»? Ĉiu kulturita kataluno scias, aŭ almenaŭ «tuj» divenas ĉe la unua esploro pri la deman-

do, ke «Ido» estas surugato de Esperanto; ke «Interlingua» estas latino *macarrònic*, kaj ke «Occidental» estas lingvo unuavide komprenebla... de Okcidentanoj, same kiel la kataluna lingvo estas komprenebla de katalunoj. Ne gravas, ke iu lingvo, aŭ projekto de lingvo, estas unuavide komprenebla aŭ legebla. La grava afero estas, esprimi sin, skribe kaj parole, en iu lingvo. Se sufiĉus tia unuavida komprenebleco, ni katalunoj povus proponi nian lingvon kiel internacian. Ni estas konvinkitaj, ke la novlatina lingvo plej simila al «Occidental» estas la kataluna. Ni memoru, ke unu el la «mirakloj» de la kataluna Sant Vicenç Ferrer, estis la fakto ke li en la mezepoko, komprenigis sin, en siaj flamaj predikoj, de ĉiuj popoloj... Nu, tio pruvas nur, ke la kataluna lingvo, ankoraŭ nuntempe, sed ĉefe tiam, estas ia speco de «natura» kaj «vivanta» lingvo Occidental...

Ni devas diskonigi la fakton, ke amiko Dalmau ĉiam propagandas Esperanton ĉu per rektaj klarigoj, ĉu per nerektaj aludoj. Vi konstatos tion, legante ankaŭ liajn du antaŭajn librojn en kataluna lingvo: «Seny i atzar» kaj «Una altra mena d'amor», kaj la semajnan gazeton de li fonditan: «Clarisme».

Mi forgesis diri, ke en la libro «Polèmica», kiel pruvo pri la taŭgeco de Esperanto por literaturo, troviĝas ankaŭ originala poemo de la eminenta ruso Nikolao Hohlov, bedaŭrinde ne sufiĉe atentata en la «neŭtrala» movado. Tiu poemo estas «Prolegomeno» (el la poemkolekto «La Tajdo», eldonita de «Heroldo de Esperanto»), katalune tradukita de mi.

JAUME GRAU CASAS, L. K.

## NEKROLOGO

La 12-an de marto mortis en Antverpeno, post mallonga malsano necesiginta kirurgian operacion, sinjoro FRANS SCHOOFS, sekretario de la Konstanta Rerezentantaro de la Esperanto-Movado.

En Kolonjo ni vidis lin la lastan jaron kaj kiel ĉiam li estis la dekstra brako de la Kongreso, la plej laborema, kun plena rego de ĉiuj problemoj. Esperanto perdis en li la plej fervoran defendanton.

Al lia malfeliĉa edzino Kataluna Esperantista Federacio esprimas sian plej sinceran kondolencon.

## ENLANDA MOVADO

Vic. — Depost la fino de la kurso de profesorino Elinjo Pähn la esperantista movado kontentige disvolviĝas dank'al la konstanta laboro de nia pioniro s-ro. Jacint Comella, kies fervoro neniam elĉerpiĝas. La lokaj gazetoj konstante publikigas artikolojn pri Esperanto aŭ el ĝi tradukitajn por pruvi la utilecon de la internacia helplingvo.

Sro. Joan Traveria, membro de la Esperantista Grupo de Vic, estis elektita urbestro. Koran gratulon al la klera samideano kaj ke li ne forgesu nin!

Terrassa. — Dank'al la subfosado de kelkaj klasbatalaj esperantistoj — ili nomas sin tiel — la loka grupo estas en dangero. Ni esperas, ke la krizo estos venkita spite la laboro de la forkurintoj.

Barcelona. — La 13-an de majo okazis en Colònia Güell la Printempa Festo, kiun depost kelkaj jaroj organizas la malnova societo Paco kaj Amo kun la helpo de la plimultaj enurbaj grupoj. La nunjara festo, kiu konsistas el sportaj ludoj kaj prelegoj en libera aero, estis aparte sukcesa kaj partoprenis ĝin ne malpli ol 700 *gepersonoj*, kiel diras la organo de la iber-amerikaj esperantistaj proletoj. La prelegoj estis atente aŭskultataj kaj nur kiam iu preleganto komencis dividi la esperantistojn laŭ burĝa kaj proleta klasoj aŭdiĝis iu protesto kaj kelkaj foriris. Oni povus elekti la okazon por tiaj mitingaj vortoj kaj eviti tiamaniere ridindajn rolojn.

Koran gratulon al la junaj komitatanoj de Paco kaj Amo, kiuj tiel brile organizas tiajn esperantistajn manifestaciojn.

—Okaze de arĝenta jubileo la grupo Barcelona Stelo organizis diversajn festojn sukcese disvolviĝintajn. La 20-an de aprilo okazis teatra vesperfesto dum kiu diversaj grupanoj ludis la katalunan komedion «Un bon debut» kaj la diletantoj de Paco kaj Amo la humoran dulingvan komedieton de Joan Gili Norta «Amors esperantistes». La sekvantan tagon kelkaj malnovaj grupanoj kaj amikoj kune festenis la felican daton.

Al la malnova grupo niajn bondezirojn kaj ke ĝi longe vivu ankoraŭ por la bono de Esperanto.